# Komunaj Tendencoj en la Dramverkaro kaj Teatro de Eŭropo en la Komenco de nia Jarcento.

N. I. KORĴENEVSKAJA (RU)

En la komenco de nia jarcento en la literaturo kaj arto de multaj eŭropaj landoj aperas novaj tendencoj. Tradicia formo kaj tradicia enhavo kontentigas nek spektantojn, nek verkistojn. Oni serĉas vojojn kaj metodojn por renovigi la arton. Preskaŭ samtempe aperas futuristoj (en Italio kaj en Rusio), ekspresiistoj (en Germanio), dadaistoj kaj surrealistoj (en Francio). Ili strebas renovigi literaturon, pentrarton, teatron. Ni volas paroli pri teatro.

Germana verkisto Bertolt Brecht (1898 - 1956) kreis la teorion de nova teatro. En sia juneco li evoluis en la konteksto de ekspresiismo; poste li alvenis al socialisma realismo. Lia teorio estas kreita surbaze de sia praktika laboro por la teatro realisma kaj politika. Lia teorio nomiĝas teorio de "epika teatro".

Ĝiaj bazoj estas formulitaj en "Rimarkoj pri la opero "Grandeco kaj dekadenco de la urbo Mahagoni" (1930), en "Malgranda Organono por teatro" (1948), en multaj artikoloj kaj eseoj.

En "epika teatro" la temo ne plu evoluas senpaŭze, sed ĝi estas ofte rompita; artistoj adresiĝas rekte al la publiko; ili kantas "zongojn" (kantojn, adresitajn al la publiko, kiuj komentas la enhavo de la teatraĵo). Ofte paralele al la ĉefa historio iras komentoj, kies funkcio estas klarigi aŭ primoki; ĉiuj figuroj laŭvice plenumas la taskon de komentanto. En la spektaklo povas esti cirknumeroj aŭ koncertaĵoj. La spektantoj ne devas "kunsenti", ili devas observi, juĝi kaj fari konkludojn.





Jen estas "la ŝanĝoj de akcento" en la "epika teatro" kompare kun la tradicia teatro:

| Tradicia drama teatro: | "Epika teatro": |
|---|---|
| Enkorpigas la agojn | Rakontas |
| Enkluzivas la spektanton | Faras de li observanton |
| Elĉerpas lian intelektan aktivecon | Vekas lian intelektan aktivecon |
| Donas al li sentojn | Devigas lin decidi |
| La spektanto partoprenas, kaj estas meze | La spektanto restas je distanco |
| Homo estas konata | Homo estas studobjekto |
| Homo estas nevaria | Homo transformiĝas kaj transformas |
| Intereso por la fino | Intereso por la evoluo |
| Natura evoluo | Muntado |
| Mondo kia ĝi estas | Mondo kia ĝi iĝas |
| Morala devo de homo | Devigoj de homo |
| La penso determinas la vivon | La socia vivo determinas la penson |
| Sento | Intelekto. [1] |

Necesas noti ke la teatraĵoj de Brecht mem tute ne nepre estas "epikaj", li verkis multajn teatraĵojn en la tradicia maniero. Inter liaj "epikaj" verkoj ni povas citi "Karieron de Arturo Ui, kiu povus ne okazi", "Akrokapuloj kaj rondkapuloj, aŭ Ĉuhoj kaj Ĉihoj", "Patrino Kuraĝo kaj ŝiaj infanoj", "Sinjoro Puntila kaj lia servisto Matti" kaj aliaj.

Unu el plej "epikaj" estas "Kariero de Arturo Ui", kie temas pri alveno de faŝismo. Sed sur la scenejo ni vidas legomvendistojn el Ĉikago, kiuj serĉas novajn merkatojn kaj batalas kontraŭ legomvendistoj de najbara kvartalo. Plej kriema kaj batalema (Hitler) organizas la lukton. Inter liaj helpantoj eblas rekoni Goebbels-on, Goering-on, Ribbentrop-on kaj aliajn. Por helpi al

1 Brecht B., "La Grandeco kaj dekadenco de la urbo Mahagoni" , 1930. Mi citas nur kelkajn trajtojn.

spektanto identigi ĉiujn figurojn Brecht proponas fari portretigan ŝminkon. Krome, samtempe kun apero de ĉiu figuro necesas proekcii dokumentajn filmokadrojn pri lia aktiveco dum milita periodo. En la teatraĵo estas komentanto, kiu klarigas la eventojn de tiu "parabola" verko. Rolantoj kantas kaj dancas. Tiu verko estas adresita al intelekto de spektantoj kaj enkluzivas ĉiujn ĉefajn elementojn de "epika" teatro.

El la rusa literaturo plej proksimas al la teorio de Brecht la teatraĵo de Vladimir Majakovski "Mistero-Buff". Ĝi estis kreita en 1918 kaj la dua varianto en la 1920. (Do, antaŭ la publikigo de teoriaj verkoj de Brecht kaj antaŭ ol la teorio formiĝis.) En la franca teatro la plej proksimas al la postuloj de Brecht la dramverko de Romain Rolland "Liluli", kreita same en 1918. Certe, tio ne estas hazardo: Brecht kreis sian teorion por la politika kaj batalanta teatro, kaj Majakovskij kaj Rolland estis ambaŭ politikaj batalantoj. Ĉiuj tri verkistoj serĉis novajn formojn por la nova soci-politika enhavo.

En la verko de Majakovskij temas pri inundo. La tero estas subakvigita, restintaj homoj konstruas grandan floson kaj serĉas la Promesitan Teron. Ili trapasas la inferon, la paradizon, la landon de ruinoj kaj trovas sian Promesitan Teron, regnon de laboristoj kaj laborantoj. Majakovskij montris la vojon de rusa revolucio.

En la verko de Rolland ĉio komenciĝas same de inundo. Homoj forlasas siajn domojn kaj terojn kaj serĉas pli bonan lokon. Du popoloj, Galipuletoj kaj Urluberloŝoj, tre pacemaj, poiomete iĝas malamikoj sub la premo de Dikuloj, Diplomatoj, Dio, Iluzio . Ĉio finiĝas per milito kaj tutmonda katastrofo: la malnova mondo pereas. Rolland montris la preparon kaj komencon de la unua mondmilito.

Ambaŭ dramverkistoj adresiĝas ne al la sentoj de spektanto, sed antaŭ ĉio al lia intelekto. Ambaŭ verkoj ne enkluzivas la spektantojn, sed rakontas; la spektanto iĝas observanto, li juĝas kaj faras konkludojn. Ambaŭ verkoj montras la mondon "tia kia ĝi iĝas". En anbaŭ "la socia vivo determinas la penson". Apartaj





epizodoj ne estas nature kunligitaj: ambaŭ verkistoj uzas la muntadon.

La publiko alkutimiĝis "kunsenti", plori kaj ridi kun herooj de spektaklo. Necesas memorigi al ĝi, ke ĝi ne devas partopreni kaj kunsenti, sed devas nur observi. Brecht ellaboris tutan sistemon de metodoj, kiuj helpas "malproksimigi" la spektanton de la teatraĵo. Brecht nomis tiujn metodojn "efekto V". [2] Li proponas monologojn, adresitajn rekte al publiko, prologon kaj epilogon, kiuj klarigas la enhavon kaj faras konkludojn; kantojn adresitajn al publiko; projekcion de titroj; afiŝojn, lastajn novaĵojn kaj informojn, aktualan materialon, ktp.

En la verkoj de Majakovskij kaj Rolland ni vidas multajn "metodojn de distanciigo": en "Mistero-Buff" estas prologo kaj epilogo, kie la verkisto klarigas sian novan estetikon; multaj figuroj sin prezentas al publiko kaj parolas pri si mem; la verko pritraktas aktualajn temojn: revolucio, milito, malsato, elektrifiko, porciokuponoj ktp., kaj eĉ inter la figuroj de la teatraĵo troviĝas Lloyd George kaj Clémenseau. Krome, la tuta verko parodias la biblian historion, kio same postulas intelektan laboron por kompari, trovi analogojn kaj kompreni.

"Liluli" de Rolland estas alegoria verko kun multaj alegoriaj figuroj: Vero kun vindita buŝo, Amo - kreteno, Frateco - kanibalo ktp., ankaŭ tiu verko postulas deŝifradon. Ĉi-tie estas konstanta komentanto - Poliŝinel, kiu prezentas al la publiko aliajn rolantojn kaj komentas ĉiujn eventojn. La partoprenantoj kantas ĥore kaj sole, klarigante siajn poziciojn. Kaj la temo estis la plej aktuala en 1918 - la mondmilito. Do, tiuj du verkoj estas kreitaj kvazaŭ speciale surbaze de la teorio de Brecht, sed en vero pli ol dek jarojn antaŭe. Tio atestas, ke la serĉoj de novaj vojoj en la arto sekvis la saman direktoj en malsamaj landoj kaj en malsamaj skoloj.

Estas pli malfacile paroli pri dramverkoj de dadaistoj kaj surrealistoj: Tzara, Breton, Apollinaire, Vitrac, Aragon kaj aliaj. Iliaj verkoj same "distaciigas" la spektanton, kiu devas observi,

2 V—Verfremdung, malproksimigo.

Majakovskij, Rolland: Brecht, Majakovskij kaj Rolland adresiĝas al la intelekto de spektanto, al lia racia penso. Dadaistoj kaj surrealistoj ignoras la intelekton kaj racian penson. Surrealistoj adresiĝas al la subkonscio, esperante veki dormantajn instinktojn. Dadaistoj proponas nur neigon kaj detruon. Ni povas diri, ke laŭ la formo dadaistoj kaj surrealistoj uzas foje similajn metodojn, sed uzas ilin por aliaj celoj ol realistoj aŭ futuristoj.

Samtempe kun novaj skoloj kaj tendencoj daŭre vivas realisma arto. Sed ankaŭ ĝi evoluas. Preferante tradiciajn formojn, verkistoj-realistoj renovigas la enhavon, ili esploras novajn temojn: revolucio (en Francio Romain Rolland verkas ciklon el ok dramoj "Teatro de la Revolucio", en Rusio dramverkoj de Maxime Gorki); ĉiutaga vivo de mizeruloj (Gorki, "En la fundo"); faŝismo (Brecht, "Timo kaj malespero en la Tria Imperio"); luktoj de laborista klaso ("Malamikoj" de Gorki); sciencisto kaj socio ("Infanoj de suno" de Gorki, "Ludo de amo kaj morto" de Rolland, "Vivo de Galileo" de Brecht).

Do, en malsamaj landoj ni vidas du ĉefajn tendencojn en la evoluo de dramverkaro kaj teatro: realismaj verkoj kun pli-malpli tradicia formo kaj renovigita enhavo kaj la verkoj eksperimentaj de la vidpunkto de la enhavo kaj la formo.

Adreso de la autorino:
Nina Ivanovna KORĴENEVSKAJA
d-ro pri Filologio
Baŝkiria Ŝtata Universitato
RU - UFA
RUSIO



# Pomarba Kancero kaj Kuracadoprovoj per Fungicidoj

HUANG YINBAO (CN)

Pomarba kancero estas la plej grava el la pomarbaj malsanoj. Ĝi troviĝas ĉie en la mondo, kie pomarboj kreskas. La malsana atako ofte pereigas la arbon, eĉ la tutan ĝardenon, pro tio oni nomas ĝin "kancero". Por efike kuraci la malsanon, la autoro faris esploradon kune kun esperantlingvaj agrikulturaj specialistoj. Longa esploro liveris fine bonefikan fungicidon.

1. Simptomo de la pomarba kancero.

Oni scias, ke la pomarba kancero povas damaĝi plenaĝajn kaj junajn pomarbojn, eĉ la idojn. Tamen, la malsano damaĝas ĉefe plenaĝajn pomarbojn, precipe la branĉiĝajn punktojn de la ĉefbranĉoj.

Ekzistas du simptomaj specoj de la malsano: la ŝeloputriĝo kaj la velkiĝo de la junaj branĉoj.

La ŝeloputriĝo: la malsana loko estas ne klare videbla en la unua tempo de la malsaniĝo. Sed oni povas vidi malgrandajn malhelflavajn punktojn sur la arboŝelo, au sub la ŝelo aperas brunaj punktoj, se oni fortiras la ŝelon. Sub la arboŝelo la punktoj fariĝas klare videblaj, kiam la kondiĉo por la malsano estas favora. Se oni premas la videblajn markojn, elfluas iom da nigraflava likvaĵo. La malsanaj ŝeloj estas facile forigeblaj. La malsanaj lokoj putriĝas, odoras je alkoholo kaj iom post iom nigriĝas kaj sekiĝas, postkiam la akva likvaĵo estas vaporiĝinta. Se pluvas au se la aero fariĝas humida, troviĝas sur la malsana loko malgrandaj punktetoj; tiuj estas sporosakoj enhavantaj multegajn sporojn de la malsaniga fungo. La malsanaj lokoj iom post iom grandiĝas. La trunka superaĵo de malsana arbo mortas pro akvo- kaj nutromanko, kiam la markoj ĉirkauas ringforme la trunkojn au la branĉojn.